# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO


**N° 209 JULIO 2001**

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO


*** *Sankta* PIO X-*a, preĝu por ni* ***


Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM




## Sommaire/*Enhavo*


| | Pages/*Paĝoj* |
|---|---|
| Le mot du président-*La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prière - *Preĝo* | 5 |
| *Kongreso* | 6 |
| *Protokoloj* | 7 |
| *Enketilo* | 9 |
| Artikoloj | 13 |
| Kalendaro | 16 |
| Anoncoj | 17 |
| Abonnements - *Kotiztabelo* | 19 |


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR


**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

## Surkovrile

Parto de la kongresanoj antaŭ la Basiliko de Sankta Tereza en Lisieux.

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 30.a de septembro 2001. Venonta bulteno aperos en julio.

Finpresado la 30/07/2001

***FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO***

**Nro 209 Julio 2001**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )

CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE

Peranto IKUE:
S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL

Redakcio :
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623.3022@Compuserve.com

# Le mot du Président

Le 1er Avril 1910 dans les locaux de l'Institut Catholique de Paris était fondée l'Association internationale des espérantistes catholiques . Le choix de l'Institut catholique incombait au professeur Gustave Gautherot, qui y enseignait l'histoire de la Révolution française.

Depuis cette date 90 ans se sont écoulés et le mouvement catholique des espérantistes français a connu bien des vicissitudes. La Première Guerre Mondiale allait faucher en pleine jeunesse Claudius Colas, qui avait été la pierre angulaire du mouvement en France.

L'après guerre permettra un redémarrage de notre action et une progression très nette de l'espéranto dans les milieux catholiques.

La Seconde Guerre Mondiale entravera grandement notre action car l'occupant nazi considerera la langue internationale comme une "juiverie" inadmissible et en interdira l'usage et l'enseignement .

A la Libération un certain flottement se produira et ce n'est que le 4 mai 1953 que sera fondée à Paris la Ligue française catholique espérantiste.

Dix huit ans plus tard elle changera son intitulé en Association Catholique Française pour l'Esperanto et fixera son siège social aux Andelys (Eure) . Ce dernier sera transféré à Baugé (M&L) le 56 mai 1977, puis à Paris le 11 juin 1996.

Ainsi malgré deux graves conflits mondiaux et les difficultés inhérentes à une période troublée de notre histoire, notre association a su conserver le cap et témoigner de la Foi chrétienne au sein du mouvement espérantiste. Il appartient à chacun de nous de continuer à porter haut le flambeau allumé par nos aînés et à faire l'effort nécessaire pour dignement continuer leur œuvre.

# La bileto de la prezidanto

La 1-an de aprilo 1910 en la salonoj de la Katolika Instituto en Parizo estis starigita la asocio internacia de la katolikaj esperantistoj. La elekto de la katolika Instituto rilatis kun profesoro Gustave Gautherot, kiu instruis en ĝi la historion de la franca Revolucio.

Depost tiu dato 90 jaroj elfluis kaj la katolika movado de la francaj esperantistoj ekkonis diversajn sortoŝanĝojn. La unua mondmilito alportis la morto de la plej juna Claudius Colas, kiu estis la ĉefŝtono de la movado en Francio.

La postmilita periodo ebligos novan starton de nia agado kaj tutcertan progreson de esperanto en la katolikaj medioj.

La dua mondmilito grave malhelpos nian agadon, ĉar la nazia okupanto konsideris la internacian lingvon kiel ne tolereblan "judaĵon" kaj malpermesis ĝian uzon kaj ĝian instruon.

Ĉe la Liberiĝo iu malcerteco okazis kaj nur en la 4-a de majo 1953 Franca Katolika Esperantista Ligo estis kreita en Parizo.

Dekok jaroj poste ĝi ŝanĝis sian nomon en Franca Katolika Esperantista Asocio kaj starigis sian sidejon en Les Andelys (Eure).

Tiu sidejo estis translokita en Baugé (M&L) la 6-an de majo 1977, kaj finfine en Parizon la 11-an de junio 1996.

Tiel, spite du gravaj mondmilitoj kaj malfacilaĵoj esence propraj al konfuzita periodo de nia historio, nia asocio sciis konservi la kapuson kaj atesti pri la Kristana Kredo meze de la esperantista movado. Ĉiu el ni devas daŭrigi por teni alten la torĉon lumigita de niaj antaŭuloj kaj efike barakti por inde daŭrigi ilian agadon.



## TRIKOTAĴO

Vivo estas kiel trikotaĵo:
Dio donas al ni la lanon kaj la trikilojn.
Li diras al ni : Trikotu, kiel eble plej bone,
Unu maŝon post la alia.

Maŝo estas tago sur la tempo-trikilo.
Post unu monato ,30 aŭ 31 maŝoj
Post dek jaroj 3650 maŝoj.
Kalkaj estas rektaj maŝoj, aliaj inversaj maŝoj.
Estas ankaŭ ellasitaj maŝoj sed oni
ne povas repreni ilin .

Kiom da fuŝitaj maŝoj !

La lano donita de Dio por trikoti
Estas el ĉiaj koloroj
Rozkolora kiel miaj ĝojoj
Nigra kiel miaj penoj
Griza kiel miaj duboj
Verda kiel miaj esperoj
Ruĝa kiel miaj korinklinoj
Blua kiel miaj deziroj
Blanka kiel mia tutplena ofero
Al Tiu, kiun mi amas ...

Sinjoro, donu al mi la kuraĝon
Finfini mian trikotaĵon
Por ke vi trovu ĝin inda
Por la eterna ekspozicio de la homaj verkoj.

F. Latraverse (Montréal ,Kanado)
Tradukis A.B

## KONGRESO EN AGRABLA ETOSO

Nia asocio kongresis en Lisieux de la 4-a ĝis la 8-a de majo 2001.

Ni loĝis en Foyer Louis et Zélie Martin en la strato de la Misiistaj Laboristinoj de la Kongregacio Donum Dei. Tiuj ĉi venas el diversaj ekster-eùropaj landoj kaj akceptis nin afable kaj varme. Post ĉiu tag-kaj vesper-manĝoj ili kantis belajn religiajn kantojn en la lingvoj de siaj landoj kaj en la franca ,kio agrabligis la restadon.

Pastro Girault el Poitiers prelegis pri Sankta Tereza kaj Esperanto, emfazante la vivon de la sanktulino, tre priokupita pri la problemoj de la malproksimaj landoj. Se Sankta Tereza ekkonus esperanton, ŝi tutcerte uzus ĝin. Pro ŝia menso tre malfermita al la problemoj de la alilanda mondo, ŝi jam havis la internan ideon de la esperantistoj.

La asocio havis sian ĝeneralan kunvenon en kiu oni analizis la asociajn problemojn kaj faris planojn kaj sugestojn por la estonteco.

En la urbo Lisieux ,agrabla promenado kondukis nin al la belega gotika katedralo, al la bone aranĝita urboparko kaj al la lokoj, kie vivis S-ta Tereza, ŝia gepatra domo "Les Buissonets", La Karmelo, kie ŝi vivis kiel monaĥino.

La lastan tagon ni ekskursis al la kastelo Saint Germain de Livet, belega renesanca konstruaĵo meze de agrabla parko, kie pavoj montris la belaĵojn de siaj kodoj.

Ni ankaù iris laùlonge de la marbordo al Honfleur, kie ĉiu admiris la antikvajn stratetojn kaj ĉefe la belegan preĝejon S-ta Katerina, konstruita tute per ligno en la XV-a jarcento de maristaj ĉarpentistoj.



## PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO EN LISIEUX LA 6-an DE MAJO 2001

Ĉeestis: S-ro Bessière,P° Héroux,F-inoj Chaney kaj Hervier, S-ro Pons
Petis senkulpigon:
S-ro Basso, Chevallier Colleu, Villeneuve

Post la baloto, F-ino Hervier anstataùas F-ton Marmou.

La asocio decidis daùre reklami en la revuo " Le Monde de l'espéranto". Tiu reklamo aperos sur tri numeroj de la revuo, fine de la nuna jaro kaj komence de la venonta.

La kotizo estos de 10 eùroj ekde la 1-a de oktobro 2001.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la merkredon la 24-an de oktobro 2001.

## PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO EN LISIEUX LA 6-an de MAJO 2001

La kunveno okazis en Foyer Louis et Zélie Martin la 6-an de majo 2001. Prezidis S-ro Bessière.

S-roj Colleu kaj Gibault (el Le Havre) salutis la kongreson perletere.

La voĉdoniloj, senditaj de la membroj, nombris 52.

La agadraporton aprobis 45 membroj, 1 sindetenis, kaj 3 voĉdoniloj estis ne validaj.

En la baloto por la renovigo de unu triono de la komitato voĉdonis 52 membroj. La kandidatoj ricevis la sekvantajn voĉojn kaj estis ĉiuj elektitaj aù reelektitaj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| S-ro Colleu | 52 | F-ino Hervier | 52 |
| S-ro Pons | 52 | S-ro Villeneuve | 52 |

La venonta ĝenerala kunveno okazos en 2002 en Parizo. Pri la venontaj kongresoj, en 2003 kaj 2005, la kunveno decidis enketi ĉe la membroj por ekkoni iliajn opiniojn kaj dezirojn.

S-ino Lerouge prezentis sian projekton eldoni en esperanto libreton kun la teksto de la biblia rozario . Kunlabore kun S-ro Colleu ŝi preparos tiun eldonaĵon.

S-ro Colleu ,rezignis, kiel peranto de IKUE kaj estis anstataùita de S-ro Pons.

ENKETO PRI NIAJ KONGRESOJ

Depost pluraj jaroj la partopreno en niaj kongresoj ne estas kontentiga . pro tio ni petas vin respondi la enketon, kiun vi trovos en la paĝoj meze de tiu bulteno en verda koloro . Bonvolu plenigi kaj sendi vian respondon ,kiel eble plej rapide ,al la prezidanto S-ro Bessière, 28 Rue Camille St Saens 76000 ROUEN.

Ni memorigas vin, ke ni kongresas unu jaron el du (dum la ne-paraj jaroj) kaj havas nur ĝeneralan kunvenon en Parizo dum la paraj jaroj.

La komitato atente studos viajn respondojn kaj publikigos la rezulton de la enketo sur la bulteno.

Ne forgesu, ke via respondo estos valora kaj utila. Ne atendu, respondu tuj !

Ni antaùdankas vin.

Plenigu kaj sendu
La verdan folion.



# ENKETILO

Ni petas niajn membrojn respondi la sekvantajn demandojn ,por ke ni ekkonu ilian opinion pri la organizado de kongreso aù aliaj aranĝoj.

## 1°) KONGRESO

Ni kutime kongresas unu jaron el du ,de vendrede vespere ĝis marde matene .

-Ĉu vi aprobas tiun kutiman aranĝon ? JES NE

-Dum la kongreso,ĉu vi deziras :

| | | |
|---|---|---|
| -prelegon pri kongrestemo ? | JES | NE |
| -ekskurson ? | JES | NE |
| -vizito al urbaj vidindaĵoj ? | JES | NE |
| -alian aferon ? Indiku ĝin ........................................ | | |
| -distran vesperon ? | JES | NE |
| -ĝeneralan kunvenon ? | JES | NE |

-Ĉu vi partoprenos la venontan kongreson? EBLE JES NE

-Ĉu vi partoprenis en unu aù pluraj FKEA-kongreso(j)n dum la 6 pasintaj jaroj ? JES NE

## 2°) SEMAJNFINA RENKONTO
(Sabate kaj dimanĉe )

- Mi preferas semajnfinan renkonton JES NE

- Mi partoprenos la venontan . EBLE JES NE

## 3°) TUTTAGA GENERALA RENKONTO
(kun komuna tagmanĝo, vizito al la urbo ,meso)

Mi preferas tuttagan ĝeneralan kunvenon JES NE

Mi partoprenos la venontan EBLE JES NE

Mi deziras ,ke ĝi okazu :
- en Parizo JES NE
- en alia loko.
- Indiku ĝin ........................................

## 4°) SIMPLA GENERALA KUNVENO.

Mi deziras nur simplan ĝeneralan kunvenon:JES NE

Mi deziras ĝin :
- en Parizo JES NE
- dum la nacia kongreso de UFE: JES NE
- en alia loko,
  Indiku ĝin ...................

Mi partoprenos la venontan. EBLE JES NE



## 5°) SE ONI ARANGOS KONGRESON AU SEMAJNFINAN RENKONTON :

A) Mi deziras ,ke ĝi okazu :
- dum la Paska lerneja libertempo JES NE
- en majo JES NE
- en junio JES NE
- en septembro JES NE
- en oktobro JES NE
- en la sama urbo aù regiono, kiel la nacia kongreso de UFE, kaj antaù aù post ĝi. JES NE

B) Okaze de kongreso aù semajfina renkonto:

a) mi deziras loĝi ;
- en religia domo JES NE
- en hotelo JES NE
- en unulita ĉambro JES NE
- en dulita ĉambro JES NE

b) mi estas preta :
- organizi kongreson aù semajnfinan renkonton JES NE
- prelegi JES NE
- prezenti distran vesperon aù diapozitivojn JES NE
- prezenti alain aferon .
  Indiku ĝin ..........................

## 6° PERSONAJ DEZIROJ AU SUGESTOJ

Indiku ilin : .........................................
.........................................................

Se vi deziras , vi povas indiki vian nomon kaj aĝon, sed tio ne estas deviga . Vi rajtas resti sennoma .

NOMO : ..........................................

AĜO : ..........................................

## Resendu la enketilon ,kiel eble plej rapide al :

S-ro BESSIERE Albert
28,Rue Camille St-Saens
76000 ROUEN

Aldono: PRI VIA BULTENO

Kiuj artikoloj interesus Vin ,ke ni enmetu en nia bulteno ?

- pri la esperanto-movado JES NE
- pri katolikaj ne-esperantistaj aferoj JES NE

Viaj sugestoj ..........................................
..........................................................



## EKUMENAJ TAGOJ DUM LA UK.

Ekumena diservo, Zagreba katedralo ,la 22-an de julio.

La ekumenan diservon ĉeestis tricento da kongresanoj. La Diservon gvidis Lajos Kobor, nova prezidanto de la Ekumena Esperanto Komisiono. Predikis Adolf Burkhart. Li menciis beatan Stepinac, kies tombo troviĝas malantaŭ la ĉefa katedrala altaro.

Ankaŭ li menciis,ia maniere reklamis ADORU .

La Ekumenan Diservon sekvis la katolika meso en Esperanto kiun kuncelebris 5 pastroj el 4 landoj (HU,DE,HR,FR).Dum la Diservo la kantadon akompanis Ernst Leuze.

(M.Belosevic)

## KATOLIKOJ EN ĈINIO
## Renkontiĝo kun la subtera eklezio

De la 13-a de aprilo ĝis la 1a de majo mi vizitis Ĉinion, laŭ invito de mia ĉina esperantista amikino Nan .Ŝi rakontis al mi interesajn aferojn :

" En Ĉinio nur 10 homoj scias ,ke mi estas katoliko. Mia pastro estas eksterlandano kaj pro tio ne rajtas celebri mesojn en preĝejoj. Li kaŝe baptis min antaŭ 3 jaroj en universitata ĉambro."

La 13-a de aprilo estis la Sankta Vendredo kaj ni do veturis al la plej granda katolika preĝejo de Pekino, kie tute hazarde mallonge post nia alveno komenciĝis meso kun krucvojo.La preĝejo (kiu en pasintaj jarcentoj estis multfoje detruita kaj rekonstruita) tute pleniĝis de ĉirkaŭ 400 homoj de ĉiu aĝo -de infaneto kun plasta maŝinpafilo en la mano tra poŝtelefonanta mezaĝulo ĝis maljunulo konstante ruktanta. Eĉ en

preĝejoj ĉinoj kondutas iomete pli libere ol ni eùropanoj. Tamen ankaù multaj kondukas tie tre devote kaj pie. Post la meso junaj kristanoj vendas bibliojn kaj kristanajn librojn antaù la preĝejo. Oni tie toleras tion, dum en librovendejoj tio estas malpermesita.

En la Paska dimanĉo ni denove iris al tiu-ĉi preĝejo. Bedaùrinde ni ne informiĝis antaùe pri la tempoj de la mesoj . Kiam ni matene alvenis ,la preĝejo estis ŝlosita.Oni rakontis al ni ,ke estis nur unu meso je 6h30 matene, ĉar en Pekino mankas pastroj.

En Xi'an - urbo pli malriĉa ol Pekino, ni jam la paskan lundon vizitis la pastron de Nan. Li estas eksterlandano, kiu oficiale vivas en Xi'an kun tute alia profesio:"La ŝtato ne rajtas scii, ke mi estas pastro."

"Mi scias ke en Ĉinio estas du katolikaj eklezioj", mi rakontis, "unu patriota kaj unu subtera".Laù la libro "A guide to the Catholic Church in China 2000" , el la 6.000.000 enloĝantoj de Xi'an nur 20.000 estas katolikoj, do malpli ol en aliaj ĉinaj grandurboj. Kaj li montris al mi ankaù ĉinlingvan katekismon, kiun li mem verkis kaj malgrandkvante fotokopiadas kaŝe. En ĝi ,li aùdacas ankaù kontraùi abortigon, kio en Ĉinio estas ankoraù vaste aplikata kiel rimedo de naskolimigo. "Pastinjare mia fratino devis abortigi, ĉar ŝi jam havas unu filinon, kaj mia bofrato ne volis perdi sian laborpostenon kiel oficiro ",malgaje rakontas al mi Nan.

Mi demandis la pastron, ĉu en la 20 jaroj, dum kiuj li nun vivas kaj kaŝe agadas en Ĉinio, la situacio de la eklezio pliboniĝas. "Ne, estas same malbone kiel antaù 20 jaroj, eble eĉ pli malbone. La situacio komencis pliboniĝi en la 80aj jaroj, sed post la masakro sur Tian'an-men-Placo en 1989 ĉio fariĝis denove terura."

La pastro proponis al ni fari meson por ni ambaù. Efektive, ĉar lia loĝejo troviĝas sur la universitata tereno, kie oni devas ne nur montri legitimilon ĉe la enirejo, sed ankaù enskribi sin kun detalaj informoj, kolektiĝo de pli multaj homoj en lia loĝejo povus veki



suspekton. "Ni devas fermi la kurtenon. Kaj se iu sonorigos, ni tuj devos kaŝi ĉion", li rakontas al ni antaù ol surmeti stolon. Neniam antaùe mi kredis,ke eĉ en la 21a jarcento mi havus ankoraù la okazon partopreni meson, kiu "oficiale" estas kontraùleĝa ,eĉ krima.

La postan dimanĉon ni partoprenas en la meso de la patriota katolika eklezio. La preĝejo, kun spaco por iom pli ol 200 homoj, estas plena. Post la meso ni renkontiĝas kun la solaj du eùropanoj - unu usona turistino, kaj unu usona monaĥino, civile vestita, kiu ankaù aktivas kaŝe kiel misiistino. Kontraste kun Pekino, en Xi'an post la meso ne okazas vendo de libroj - sed kelkaj dekoj da plejparte hadikapitaj almozpetantoj altrudas sin al la vizitantoj de la meso, esperantaj je la kompatemo de la kristanoj.

La duan dimanĉon ni vizitas la meson kune kun la eksterlanda pastro kaj du knabinoj, kiujn li interesigis pri la katolika agado. "Vi vidis, ke la meson celebris la episkopo mem", la pastro poste rakontis al mi, "li estas maljuna kaj malsana, sed tre fidela al Romo. Kaj li eĉ menciis la nomon de la Papo en la meso, kvankam tio estas severe malpermesita. Nur li kuraĝas fari tion".

La pastro ankoraù rakontas, ke lastatempe en Xi'an okazis kampanjoj kontraù Vatikano, i.a pro la sankt-proklamo de la 119 ĉinaj martiroj: "Oni diras, ke ili ne estis sanktuloj, sed krimuloj." Tamen kun ĝojo mi konstatis, ke en Ĉinio eblas trovi ankaù multajn homojn, kiuj scias ke la krimuloj ne estis la martiroj, sed tiuj, kiuj mortigis ilin.

El ret-mesaĝo de Ulrich Matthias. (Germanio)

# KALENDARO

## 2001

| | |
|---|---|
| | STRASBOURG (Francio) |
| 29/07 | 57-a Internacia Junulara Kongreso |
| | www.esperanto.org/ijk2001 |
| ĝis | Estos biciklan karavanon el |
| 05/08 | Londono kaj el Barcelono. |
| | SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomys |
| 04/08 | 20-a IKUE E-Tendaro. |
| ĝis | En tendara frateca kaj amikeca etoso |
| 11/08 | Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE . |
| 07/09 | BARZA D'ISPRA (VA) (Italio) |
| 11/09 | 15a Itala Katolika E.o Kongreso |

## 2002

Kromeriz (Ĉehio)
55a IKUE Kongreso
20 ĝis 27-a de julio


La urbo estas en Moravio kun 30.000 enloĝantoj.Ĝia ĉefepiskopa kastelo kun vastaj kastelaj ĝardenoj estas envivigitaj en listo de mondaj kulturaj kaj naturaj heredaĵoj de UNESCO. Kaj nur kelkajn metrojn de la kastelo troviĝas la Ĉefepiskopa Gimnazio, kiu fariĝos agrabla kongresejo de la 55-a IKUE-kongreso.

Por informoj skribu al: Miloslav SVACEK
Trsicka 6,
CZ-75127 PENCICE Cehio.



Pierre MASSET

**LA DERIVE DE L'HUMAIN**




**Eldonis :**La Plume Déliée
BP 27
34431 ST-JEAN de VEDAS
Cedex 1
**Prezo:** 100 FF ,inkluzive de la sendado.

**La libro** en franca lingvo:

Ce livre est une radioscopie. L'image vivante d'une société vivante -la société française d'aujourd'hui - avec ses différents organes vus de l'intérieur et dans leur fonctionnement: l'économie,la politique, la culture, la moralité, les institutions et les hommes.

Le Chapitre 8 : "Savoir ce que parler veut dire - La dérive du langage. Quelle langue internationale ?

**La aŭtoro:**

Professeur en philosophie,Pierre MASSET s'intéresse surtout à la pensée contemporaine. Il est membre de l'Académie des Sciences et des Lettres de Montpellier et membre de notre association ACFE !

Gratulojn pro via interesa libro, favora al esperanto!

**Ulrich Matthias**

**ESPERANTO**
**La nova latino de la eklezio**




**Eldonis:**
**Flandra Esperanto-Ligo**
**Frankrijklei 140**
**B-2000 Antwerpen (Belgio)**
eldonado@fel.esperanto.be

**La libro**

Jam de pli ol 100 jaroj Esperanto servas al la komprenigxo inter kristanoj el la tuta mondo. Tiu cxi libro rakontas pri la historio kaj nuntempo de la katolika kaj protestanta Esperanto-movado. Kaj gxi vortigas la argumentojn por lingvo, pri kies avantagxoj kristanaj esperantistoj cxiam denove konsciigxas.
La libro estas esperantigo - kun kelkaj gxisdatigoj kaj adaptigoj por internacilingva publiko - de la samtitola germanlingva "Esperanto - das neue Latein der Kirche", ankaux verkita de d-ro Ulrich Matthias.

**La auxtoro**

D-ro Ulrich Matthias, naskita en 1966 en Bad Pyrmont, Germanio, studis matematikon en Heidelberg, kie li doktorigxis en 1994. Li laboras kiel asekura matematikisto en Wiesbaden. Esperanton li eklernis en 1986. Ekde tiam li partoprenis - krom en la gxenerala movado - ankaux en multaj katolikaj kaj ekumenaj Esperanto-arangxoj. Ekde 1992 li estas estrarano pri publikaj rilatoj de la germana sekcio de Internacia Katolika Unuigxo Esperantista (IKUE). Li edzigxis la 26an de julio 2001 kun cxina esperantistino.



## AUSKULTU VATIKANAN RADION

En esperanto la elsendoj okazas en tri tagoj de la semajno , en la sama horo 21.20 MET

DIMANĈE - Horo 21.20 laù mezeùropa tempo (10')
Mezonde :527 kaj 1530 kHz Kurtonde 4005 (74.90 m), 5880 (51.0m)
Satelite : EUTELSAT Hot Bird II 13° East 11804 Mhz
Polarizadon Vertikalan Transponder 54 RAI

MERKREDE kaj JAUDE : Horo 21.20 MET
Mezonde 1611 kHz,Kurtonde 7250(41.37m),9645(31.10m)
Satelite: INTELSAT 602.62° East 4097.100 Pol.LHCP)
Interreto: sama horo
http://www.vatican.va/news_services/radio/multimedia
aù http://www.vaticanradio.org )

## Kotiztabelo 2001

| | Frankoj | Euroj |
|---|---|---|
| I.K.U.E kun "Espero Katolika" | 164 | 25,00 |
| Peranto : S-ro PONS<br>Rue du 8 Mai 1945<br>87510 NIEUL. | | |
| A.C.F.E kun "Franca Katolika E-isto unuopulo : | 60 | 9,15 |
| geedza paro : | 80 | 12,20 |
| gejunuloj ĝis 25jara, pastro,religiu(in)o : | 30 | 4,57 |
| bonfaranto : | 200 | 30,50 |

Pagu al: S-ro VILLENEUVE G. 14,Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON je la nomo de ACFE

Dépot légal : 2eme trimestre 2001 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO